

10



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

OKTOBRO 1963

E N H A V O

* * * La Oktobra Revolucio	1
G. Gusev. La nova astro (versaĵo)	2
* * * Rezolucio de la 48-a UK	2
Veselin Hanĉev. Antaŭle en pachtalo (versaĵo)	3
Georgi Dimov. Postkongresa renkontiĝo en Varna	4
* * * Dankoj kaj gratuloj	5
Atanas D. Atanasov — Ada. Dudek-dua leciono	6
Violin Oljanov. Figura stilo	8
D. Trudoljubov. Glaŭko Pompilio — gasto de la esperantistoj en Jambol	10
Adolf Holzhaus. Unuaj bulgaraj esperantistoj	12

*Abonkotizo : jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio,
Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.*

*Reklamtarifo : 0,15 levoj por cm²; korespondanonces : 5 stotinkoj por ĉiu
vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpaĝo — 60 lv.*

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa,
Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6,
Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang
P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Sep-
tembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul 52/54
kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



LA OKTOBRA REVOLUCIO

Kvardek ses jaroj pasis depost kiam la Komunista Partio de Sovet-Unio ekdirektis la sorton de la popoloj, loĝantaj sur la giganta teritorio de cara Ruslando, kiun siatempe oni nomis „malliberejo de la popoloj“.

Vera malliberejo estis Ruslando sub la kruela reĝimo de la caro kaj la kapitalistoj — rusaj kaj fremdlandaj. Tamen nur dum 46 jaroj la postrestinta lando transformiĝis en unuarangan forton. Hodiaŭ Sovetunio estas unu el la potencaj ŝtatoj en la mondo. Tio ĉi estas ŝuldata al la granda sovetia popolo, kiu konstruas la novan vivon sub la gvidado de la Lenina partio.

La influo de la Oktobra Revolucio estas sentata ĉie en la mondo. Dank' al ĝi triono de la homaro vivas kaj laboras por la socialismo. Dekoj da koloniaj popoloj liberiĝis kaj ekiris la vojon de memstara ŝtata ekzistado.

Sinceraj amikoj kaj defendantoj de la popoloj, forĵetintaj la jugon de la koloniismo estas Sovet-Unio kaj la ceteraj socialismaj landoj, la internacia komunista movado. Sovet-Unio subtenas ĉiuflanke la naciliberigan movadon.

La Soveta Registaro fidele sekvas la Leninan politikon de paca kunekzistado de ŝtatoj kun diversaj sociordoj. Ja en paco nur povas plu disvolviĝi la produktadfortoj en socialismaj landoj, povas plialtiĝi la bonstato de la popolamasoj. Tion tamen ne povas kompreni la ĉinaj kamaradoj, kiuj neas kaj kontraŭagis la saĝan politikon de Soveta Komunista Partio.

Kune kun la Bulgara Komunista Partio, ankaŭ ni, bulgaraj esperantistoj subtenas la politikan linion, ellaboritan dum la XX kaj XXII kongresoj de la Komunista Partio de Sovet-Unio.

Sovet-Unio estas la lando, kiu donis gravan puŝon al la esperanta movado post la unua mondmilito. Aperis en tiu lando esperantaj libroj kaj gazetoj, kiuj utilis al ni ĉiuj. En Sovet-lando aperis ankaŭ libroj de bulgaraj esperantistoj. Jen pro kio ni estas dankaj al tiuj, kiuj per sia batalo helpis la venkon de Oktobra Revolucio.

Neniam ni forĝos la meritojn de la Soveta lando al Esperanto.

Okaze de la granda datreveno ni sendas niajn plej varmajn salutojn, al la sovetaj esperantistoj kaj deziras al ili novajn sukcesojn en la konstruado de komunismo kaj en la disvastigo de la internacia lingvo.

Vivu la granda Soveta Popolo!

Plej korajn salutojn al la gvidantoj de la Soveta Popolo ĉefrunte kun Nikita Sergejeviĉ Hruŝĉov.

LA NOVA ASTRO

Jen astro nova — Tereškova Valja...
Nin ĉiujn ravas ŝia lumo hela.
Ne stelo kina, nek la festivala! —
la vera stelo estas ŝi: ĉiela!

Kaj per fiero, miro kaj admiro
pleniĝas ĉiu koro de virino: ^{ŝi}
la kosman alton de la aglo-viro
atingis nia brava albatrino!

Promesas vi, lumilo senmakula,
feliĉan, ĝojan vivon al la mondo,
prilumas via belo bluokula
orbiton de la bono kaj estonto.

Rideto via, junulino ĉarma,
brilante tra senlima kosma spaco,
fiaskon portas al milit' malvarma
kaj senrifuzan armon al la paco!

Virinoj, superantaj virojn-mastrojn,
konkeru la plej vastajn kosmajn forojn
kaj kiel bluajn florojn pluku astrojn
kaj kiel steloj — niajn amajn korojn!

Jen astro nova — Valja Tereškova.
Prikantu ŝin, enamiĝinta verso!
Virina varmo, vivodona, kova,
hejmgigas vaston de la universo...

K. Gusev, Moskvo



REZOLUCIO DE LA 48-a UK

La 48-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Sofio de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1963, apogas la jenan rezolucion, kiun rekomendis al ĝi la Internacia Konferenco de Lernejoj:

La Internacia Konferenco de la Lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata, okazinta en Beograd, Jugoslavio, de la 28-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1963, en la ĉeesto de 214 profesoroj, pedagogoj kaj instruistoj el 20 landoj:

1) Konstatas, ke la Internacia Lingvo faris konsiderindan progreson, disvastiĝis tra la tuta mondo kaj penetris en ĉiujn sociajn tavolojn; ke ĝi daŭre kaj

progresive riĉiĝas per nova kultura enhavo, per multnombraj tradukoj el ĉiuj lingvoj kaj per literatura kaj scienca kreado originale en Esperanto; ke lernolibroj kaj vortaroj por Esperanto estas publikigitaj praktike en ĉiuj naciaj literaturaj lingvoj; ke, paralele kun la disvastigado, kun la multoblighado de la internaciaj kontaktoj inter la personoj, kiuj ĝin uzas, kaj ĝenerale paralele kun la vastigo de ĝiaj aplikoj en la praktiko, la lingvo interne tre evoluis, sed samtempe konservis kaj fortikigis sian unuecon kaj koherecon; ke sekve la Internacia Lingvo farigis nekontestebla socia fakto, internacie

enradikiĝinta kaj matura por plua, multe pli vasta utiligo en ĉiuj formoj de internaciaj rilatoj.

2) Memorigas, ke UNESKO per sia Rezolucio de la 10-a de decembro 1954 rekonis, ke „la rezultoj atingitaj per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj intersanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo... respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO“, kaj komisiis la Ĝeneralan Direktoron de UNESKO „sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo“; ke per la sama Rezolucio UNESKO konstatis la fakton, ke pluraj ŝtatoj deklaris sin pretaj „enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj“ kaj petis tiujn ŝtatojn membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo.

3) Konstatas, ke ekde la akcepto de tiu Rezolucio en 1954 la lingva problemo en la internaciaj rilatoj plue akriĝis, kion montras ankaŭ la pligrandiĝo de la nombro de tiel nomataj oficialaj kaj laboraj lingvoj en diversaj internaciaj organizaĵoj; ke pro la konstanta ampleksiĝado de la internaciaj rilatoj mem al novaj sferoj kaj pro la daŭre kreskanta nombro da personoj, kiuj ĉiam pli partoprenas en internacia komunikado, de internacia politiko kaj scienco ĝis ordinara turismo, la neceso de komuna neŭtrala lingvo sentiĝas ĉiam pli kaj pli; ke en ligo kun tio la edukaj instancoj de diversaj landoj montras kreskantan interesigon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj kaj ke, rezulte, la Internacia Lingvo estis instruata en la lerneja jaro 1962/1963 en minimume 533 lernejoj de 32 landoj al minimume 15339 ĝenerallernantoj kun tre kontentigaj rezultoj.

4) Esprimas sian konvinkon, ke la lingvan problemon en la hodiaŭa mondo povas plene kaj ĝuste solvi — sen avantaĝoj por unuj kaj sen humiligoj por la aliaj — nur la neŭtrala lingvo

Esperanto, pruvita kiel perfekta instrumento de internacia komunikado dum pli ol 75 jaroj, kaj opinias, ke la plej efika metodo por la plua praktika utiligo de tiu lingvo en la internaciaj rilatoj estas ĝia paralela kaj laŭgrada enkonduko en la lernejojn.
Tial la Konferenco

DECIDAS

a) Direkti alvokon al ĉiuj registaroj plej atente pristudi la eblecon enkonduki laŭgrade la Internacian Lingvon Esperanto en la lernejojn kaj universitatojn kiel lernobjekton;

b) Peti ĉiujn interesitajn Registarojn iniciati traktadojn por subskribo de Internacia Konvencio por laŭgrada enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj universitatojn, ĉar nur paralela instruado de tiu lingvo en pluraj ŝtatoj povas doni efikan rezulton;

c) Komisiu ĉiujn delegitojn en la Konferenco, kaj la landajn Esperanto-Asociojn, transdoni tiun ĉi Rezolucion, kun apogo de la landaj kulturaj kaj edukaj organizaĵoj, al siaj respektivaj Registaroj kaj doni al ili ĉiujn necesajn informojn rilate la instruadon de Esperanto en la lernejoj.

Veselin Hanĉev

ANTAŬEN EN PACBATALO

Laŭ patri' kaj koloro
ni estas malsamaj,
disiĝas nin ĉiam terspac',
sed kune, kuraĝe
la koroj pulsadas
en la batalo por pac'!

Trans limoj disiĝaj,
trans retoj metalaj,
tra l' hurlo de l' maro, sen lac',
la manojn vi donu,
junuloj, infanoj!
Antaŭen en lukto por Pac'!

Tradukis: *Rosica Georgieva*

POSTKONGRESA RENKONTIĜO EN VARNA

La streĉa kongresa laboro finiĝis. LKK tamen prizorgis ankaŭ pri la agrabla ripozo de la kongresanoj. Unu el la vizitindaj lokoj ja estas nia suna belulino Varna. Parto de la gekongresanoj veturis per la aŭtobusoj de „Balkanturist“, aliaj per aviadiloj, vagonaroj, ŝipoj kaj privataj aŭtomobiloj. Dominis tamen la gastoj el Pollando kaj Hungario, kiuj amase vizitis la urbon.

La esperantistoj de Esperanto-societo „Albato“ estis speciale ĝojaj — ili havas novan klubojn en la centro de la urbo! Dank’ al la malavara helpo de la Urba Soveto kaj pleje al ĝia prezidanto — nia malnova samideano Nikolaj Bojaĝiev la esperantistoj en Varna forlasis la etan klubojn kaj akiris novan, vastan ejon!

Por esprimi sian grandan simpatian al la pacaj batalantoj — la esperantistoj el tutmondo, la 12-an de aŭgusto, la Urba Soveto organizis en la granda salono de la Kultura Domo de Ŝipkonstruistoj folkloran artesperon. En ĝi partoprenis la danckolektivoj de lernejo „Ivan Vazov“ kaj tiu de la Soveto, la popolkantistinoj Sonja Kânĉeva, Dobra Savova kaj Maria Uzunova, la majstro-ludantoj je popolinstrumentoj Ivan Angelov kaj Ivan Stojanov k. a.

La gastoj per vigla intereso sekvis ĉiun prezentitan programon kaj per koraj aplaŭdoj esprimis sian dankon kaj kontenton al la plenumantoj.

Je la nomo de la Urba Soveto kaj la socia aktivularo de Varna bonvenigis la gastojn Nino Ninov — estro de la Fako „Kulturo kaj Arto“. Li diris:

„Ni estas feliĉaj, ke en nia lando renkontiĝis dum sia 48-a Universala Kongreso la esperantistoj el la tuta mondo, ke Bulgario estis honorita esti ĝia organizanto, forumo por nova impona manifestacio de la kvin kontinentoj, vivi en paco, amikeco kaj interkompreniĝo. Ni estas speciale ĝojaj kaj

pro tio, ke la tagoj de la kongreso koincidis kun nova impona venko de la monda Paco — la subskribo de la Kontrakto en Moskvo por parta malpermeso de la nukleaj provoj.

Gekamaradoj, permesu al mi ankoraŭfoje saluti vin okaze de via restado en nia urbo kaj bondeziri al vi agrablan kaj fruktodonan restadon. Vivu Esperanto! Vivu la Paco en la tuta mondo!“

La lastaj du frazoj estis prononcitaj de N. Ninov en Esperanto. Per tondra aplaŭdo, la ĉeestantoj en la plenplena salono esprimis sian dankon al la parolinto.

La sekvantan tagon la loka ĵurnalo „Narodno Delo“ kaj Radio-Varna detale raportis pri ĉi okazintaĵo. La saman tagon, la gastoj, partoprenintaj la „oficialan“ ekskurson al Varna daŭrigis sian vojon laŭ la programo. Ili estis kontentaj, ke havis la eblon vidi ĉi tiun ĉarman lokon kaj promesis baldaŭ viziti denove ĝin, sed por pli longa tempo, ĉar ja, Varna kaj speciale ĝia ĉirkaŭaĵo — „La Ŝtona Arbaro“ (unika en la mondo), la monaĥejo „Alaĝa“, la somerrestadejo „Druĵba“ („Amikeco“) kaj la mirinde belaj „Oraj Sabloj“ meritas ilian atenton. Multaj tamen restis kaj ankoraŭ ne volas disiĝi kun ni. Eĉ iuj, kiel ekzemple s-ro Harold Toms el Anglujo, tute sincere esprimis sian deziron pasigi la reston de sia vivo en gastama kaj paca Bulgario...

Ni estas certaj, ke la 48-a Universala Kongreso de Esperanto kontribuis al la Paco kaj donis modelan ekzemplon de paca kunekzistado tutmonda.

*Docento Georgi Dimov
Varna*

Prezidanto de E.-societo
„ALBATO“

Prof. D-ro Hideo Yagi, Prezidanto de UEA, sendis al LKK jenan leteron:

„Antaŭ ĉio alia mi dankas Vin ĉiujn por Via afabla akcepto kaj prizorgo, kiun Vi bonvolis doni al mi dum mia restado en Sofio!

La Kongreso estis vere granda sukceso, epokofaranta en ĝia skalo kaj la enhavo. Estis ĝojinde, ke ĉiuj partoprenantoj povis plene ĝui la semajnon dank' al la bona aranĝo. Mi kore gratulas Vin por la sukceso de la Kongreso.

Mi revenis hejmen la 16-an de Aŭgusto tra Grekujo kaj Turkujo. Tuj post unu semajno, nome la 24—25-an de Aŭgusto oni havis en urbo Osaka la 50-an Japanan Kongreson de Esperanto, en kiu mi partoprenis por raporti pri la Sofia Kongreso kaj ankaŭ por montri lumbildojn, kiujn mi mem faris en Sofio, Vitoŝa kaj Rila. Laŭ peto de la organiza komitato mi prelegis du fojojn, unu japanlingve kaj la alian Esperante. Al mi ŝajnis, ke la aŭskultantoj estis kortuŝitaj kaj kontentaj.

La preparo de la Tokia Kongreso iras glate kaj mi tre esperas, ke Vi povu alveturi al Japanujo por ĉeesti ĝin. Vi estos kore akceptitaj.

Denove dankanta al Vi kaj kun feliĉa rememoro pri la Kongreso, mi restas,

Samideane Via,

Hideo Yagi“

* * *

La Prezidanto de la Franca Asocio por Esperanto René Llech—Walter el urbo Perpignan, sendis leteron al k-do Georgi Trajkov, Unua Viccefministro de PR Bulgario, en kiu li dankas pro lia ĉeesto ĉe la solena malfermo de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto kaj esperas ke Bulgario estos la unua ŝtato kiu subskribos la interŝtatan konvencion por enkonduko de Esperanto en la lernejoj.

S-ro Llech—Walter daŭrigas sian leteron skribante:

„Mi estis tre feliĉa viziti vian belan landon kaj ĝui la plezuron babiladi kun la bulgara popolo tiel ĉarma kaj afabla.

Dank' al kamaradoj Vâlĉanov kaj Vălev el Dimitrovgrad mi povis viziti la mirindan kombinumon kaj poste bani en Nesebr kaj Varna, vidi la Balkanajn Montojn, admiri la verdajn ĉirkaŭaĵojn de Sofio ktp.

Vere nian ardan deziron de Paco ni retrovis ĉe niaj bulgaraj amikoj kaj tio estis por ni ĝojiga sento.

Vivu Esperanto! Vivu la Paco!“

* * *

La Prezidanto de LKK ricevis jenan telegramon el USSR okaze de la nacia festotago la 9-a de Septembro:

Okaze de via festotago ni gratulas vin kaj viajn familiojn. Ni deziras sukceson en via nobla agado, sanon, feliĉon. Elkore ni dankas pri la neforgesebla gastameco.

VETURO AL LA KONGRESO

Dudek-dua leciono

Ĉu estas homo pli feliĉa ol mi?

La vagonaro flugas al okcidento kaj portas nin al la malproksima kongresurbo — la ĉefurbo de Esperantujo ĉi-jare... La frapetado mem de la radoj estas agrabla muziko por miaj oreloj. En la kupeo estas nur ni — mi kaj ges-roj Petersen — kaj silentas en ia streĉa animstato. Ankoraŭ freŝe staras antaŭ ni la bildo de la grupeto da entuziasmaj kaj sindonaj amikoj-esperantistoj, kiuj nin adiaŭis ĉe la Sofia stacidomo, svingis tukojn kaj flagetojn kaj post-rigardis envie la forirantan vagonaron, kiu forportis nin la feliĉulojn. La manoj de s-ino Petersen estas supersŭtitaj de amaso da belaj floroj, kiujn ŝi ricevis ĉe la ekveturo...

Landlimo. Aperas dogana oficisto por kontrolo de la pakaĵoj. Kompreninte, ke ni estas esperantistoj veturantaj al la Universala kongreso, li tuj alparolis nin en Esperanto. Do — samideano. Nu, la kontrolo de niaj pakaĵoj konsistis nur el kelkaj demandoj. La esperantistoj ne estas suspektindaj homoj.

Oni kontrolas ankaŭ niajn pasportojn. Reprezentanto de la Nacia banko informiĝas pri la valuto, kiun ni kunhavas.

La formalajoj pasis. Ni estas denove en movado. Jam la vagonaro kuras en alilanda teritorio. Strange: nenio ekstere montras tion. Samaj pejzaĝoj: intermontoj, rokoj, poste kampoj, kiajn ni vidis ankaŭ en la bulgara lando.

Ni observas la pejzaĝon, ni interbabilas, poste venas laciĝo, iu el ni oscedas, alia imitas... Dormeto ekpremas nin en la varmaj posttagmezaj horoj...

Sed jen la Belgrada stacidomo. Al ni aliĝas ankoraŭ du samideanoj — serbo kaj kroato, kiuj same veturas al la kongreso. Nia kupeo ekviviĝis. Demandoj, respondoj, rakontoj.

Denove landlimo. Denove formalajoj. La vagonaro jam flugas tra la hungaraj ebenaĵoj. Budapeŝto. Novaj geamikoj alvenas. Nia grupeto grandiĝas. Kaj ja ankaŭ la viveco en la vagono.

Kaj tiel daŭras senĉese. En ĉiu granda urbo al ni aliĝas novaj kongresontaj samideanoj. Interjekcioj, demandoj, babilado, kantoj, ŝercoj, ridi... Anguleto de Esperantujo.

En iu stacidomo, kie ni devis ŝanĝi la vagonaron, okazis danĝera miskompreno. Fervojoficisto, probable pro misaŭdo, direktis nin al neĝusta vagonaro. Ni estis veturantaj en alian direkton. Feliĉe inter la vojaĝantoj en la nova vagono troviĝis samideano, kiu tuj komprenis la eraron kaj avertis nin.

Troviĝinte en la ĝusta vagono, ni komencis komenti la okazon: unue serioze kaj ekscitite, sed iom post iom ĉio transiris en ŝercojn kaj senofendajn incitojn.

Kaj la vagonaro flugis kaj portis nin plu.

PROVERBOJ

Kien ajn mi pafas, ĉie mi mistrafas.

El la faraĉo fariĝis kaĉo.

Kiu amas okulaĉi, ne havas kion maĉi.

SUFIKSO

AĈ — esprimas malbonan kvaliton (fizikan, laŭ ekstera aspekto): domaĉo, libraĉo.

Li ridaĉas — li ridas malbele, malagrable. Li okulaĉas — li rigardas kun malagrabla fiksado kaj grimaco.

NOTO — *Por esprimi abomenan senton pri moralaj kvalitoj oni uzas prefikse la interjekcion fi: fihomo — homo malnobla, malhonesta; homaĉo — homo, kiu vekas abomenon per sia ekstero; fiago — ago, kiu provokas indignon kaj abomenon.*

PREFIKSO

MIS signifas, ke io estas farata malbone, fuŝe, erare, ne kiel devus esti: miskompreno — erara kompreno.

Mi misaŭdis — mi aŭdis ne ĝuste tion, kion oni diris al mi.

Misuzo — malbonuzo, neregula uzo kontraŭ la malbonaj moroj.

NOTINDAJ VORTUZOJ KAJ ESPRIMOJ

Intermonto — en montaro: spaco, valo inter du najbaraj montoj.

Ĉi-matene — en la hodiaŭa mateno. Ĉi-jare — en tiu ĉi jaro, en la nuna jaro, en la kurrenta jaro.

Same: ĉi-vespere, ĉi-nokte, ĉi-loke, kc.

Ĉi-kune mi sendas la kvitancon.

Kaj de tempo al tempo — feliĉe tre rare — estas videbla iu malgrasa ĉevalaĉo, kiu paŝtas sin sur malriĉherba monta kampo, aŭ ia kaduka domaĉo, izolita en la monto... Ĉi-loke la kulturo ankoraŭ ne penetris.

EKZERCOJ

1. Respondu al la sekvantaj demandoj:

Ĉu vi emas veturi?

Ĉu vi havis okazon veturi eksterlanden?

En kiuj landoj vi estis?

Kiom da tempo vi pasigis en eksterlando?

Ĉu al vi estas agrabla dogana kontrolo?

Ĉu vi ŝatas partopreni universalan esperantistan kongreson?

2. En la subaj frazoj anstataŭigu la kursivajn vortojn per aliaj samsencaj esprimoj:

Neniokaze ni akceptos lian inviton.

Kaŭze de via ĉiama dormemo vi ne povis veni ĝustatempe en la stacidomon kaj vi preterlasis la vagonaron.

Nun, *kiam ni jam ellernis* la internacian lingvon, mi povas veturi *en fremdan landon*

Ĉu oni povas trovi bonan hotelon en via urbo?

Ĉu oni povas viziti ĉiutage la muzeon?

GRAVA KAJ URĜA POR LA MEMBROJ DE UEA

La malnovaj membroj de UEA povas renovigi sian membrecon por jaro 1964 per nia asocio. Ni atentigas, ke dum la 48 UK oni plialtigis la membrotizon jene: por **Membro-Abonanto — 6,50 lv.**, por **Membro-Jarlibro — 3,25**. La Membro-Abonanto ricevas membrokarton, membro-markojn, Jarlibron kaj gazeton „Esperanto“. La Membro-Jarlibro ricevas la samon sen la gazeto. **Novajn membrojn por UEA ni ne povas akcepti pro malfacilaĵoj transferi valuton.**

Ni akceptas ankaŭ ĉi-jare abonojn por:

„Heroldo de Esperanto“ 4,68 lv.

„Monda Kulturo“ 4,88 lv.

Limtempo por ĉiuj-ĉi sumoj estas la fino de novembro. Post tio por neniu ni povos fari escepton.

CK de BEA

FIGURA STILO*

La adeptoj de la absoluta logikeco de Esperanto opinias, ke ĉiu frazo, frazero, aŭ vortkunligo devas subigi ekskluzive al la rekta logika senco de ĉiu vorto kaj al la logika interligo. Tiuj esperantistoj tradukante belantan verkon ofte vulgarigas la stilon de la aŭtoro, mortigas ĝian vivecon kaj bildecon ofere al la miskomprenata logikeco.

Ne hazarde Zamenhof konstruis nur la fundamenton de la lingvo. Li genie antaŭvidis, ke iu ajn lingvo ne povus travivi longe, se oni enketenigus ĝin en feraj kadroj, antaŭe difinitaj. Ĝi devas disvolviĝi laŭ la ĝeneralaj leĝoj de disvolviĝo de la naciaj lingvoj per iom-post-ioma evoluado, per vasta uzado, per talentaj aŭtoroj. En tiu sia evoluo Esperanto ne povus ne sperti la influon de iu aŭ alia nacia lingvo. Kiuj naciaj lingvoj influos plej forte al Esperanto, tio dependos de diversaj faktoroj: elstaraj esperantaj aŭtoroj, forteco kaj aŭtoritato de la Esperanto-movado en iu ajn lando, disvasteco de iu ajn nacia lingvo ktp. Per tiu ĉi influo en E. kreiĝas tradicia signifo de vortoj, esprimoj kaj formoj, firmaj senckunligoj. Ili kreas pli grandan variecon kaj vivecon de la lingvo kaj ni ne devas timi ilin. Tiajn firmajn senckunligojn, kiuj pli aŭ malpli foriĝas de la rekta logika signifo de la vortoj, ni jam uzas eĉ en la ordinara parolo. Ekzemple ni uzas la esprimon *havi lokon* anstataŭ *okazi* kaj ja ne nur kiam la parolo koncernas spacon kaj lokon, sed ankaŭ tempon. *La 48-a Universala Kongreso havis lokon en 1963.*

Al iuj esprimoj ni tiel kutimiĝis, ke ni ne plu sentas ties metaforecon kaj perceptas ilin tute naturaj.

Ekzemploj:

Tuŝi la koron. Kiel bonege la vestoj sidas al li! Pollando estas la lulilo de Esperanto.

En la unua esprimo neniuj tuŝas per fingroj la koron, en la dua — la vestoj ne sidas sur seĝo, en la tria — oni ne lulas Esperanton en lulilo.

Surbaze de figura uzo de vortoj kaj esprimoj, kiel en la aliaj lingvoj, tiel ankaŭ en E. oni povas utiligi diversajn literaturajn figurojn. Mi prezentos iujn el ili.

Metaforo estas tia alegoria vorto kiu entenas similigon de iu objekto aŭ fenomeno al alia. La metaforo emfazas en la objekto aŭ la fenomeno iun ĝian plej gravan karakterizaĵon kaj tiumaniere ĝin „vivigas“, aldonas al ĝi figurecon, ilustrecon. Metaforan sencon oni povas doni al diversaj partoj de la parolo.

Ekzemploj:

Ĉinio hurlas (verbo). *Abrupta respondo* (adjektivo). *Feraj nervoj* (adjektivo). *Mallumaj agoj* (adjektivo). *Tio estas ne homoj, sed lupoj* (t. e. avidaj, kruelaj, — substantivo).

Ĉe iuj aŭtoroj renkontiĝas vastaj metaforoj, konsistantaj el pluraj propozicioj, esprimoj, senckunligoj kaj kreantaj malsimplan artan figuron. Preskaŭ la tuta esperantista himno estas metafora.

*En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko,
per flugiloj de facila vento,
nun de loko flugu ĝi al loko.*

* El la preta por preso Cramatiko de Esperanto.

*Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion,
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.*

Personigon oni nomas metaforo, en kiu senvivajn objektojn oni similigas aŭ eĉ identigas al vivaj, aldonas al ili kvaliton de viva estulo.

Ekzemploj:

La mont' akuŝis kaj elpuŝis ĝemegojn (Kaloĉaj). *Balkano kantas kanton ribelan* (Botev, trad. Dobrev).

Personigojn oni renkontas plej ofte en la fabeloj kaj la fabloj.

La komparo alproksimiĝas al la metaforo, sed ĝi estas pli ordinara kaj ofte renkontata figuro. Ĝi estas uzata ankaŭ en la ĉiutaga parolo. Iu objekto, eco aŭ ago estas komparata kun alia. La nomo de la komparata objekto ligiĝas kun la komparo per la konjunkcioj: kiel, samkiel, kvazaŭ, simile al..

Ekzemploj:

Simile al stelo en nokta ĉielo, al ni la direkton ĝi diras (Z). *La ĉielo aspektis, kvazaŭ ĝi estus balaita* (Z). *La popoloj interproksimiĝos kiel unu familio* (Z).

Metonimio estas nomata tia vorto kun metafora signifo kiu entenas alinomigon — anstataŭigon de la nomo de la objekto, pri kiu oni parolas, per nomo de alia objekto, kiu troviĝas en spaca aŭ tempa apudeco kun la unua..

Ekzemploj:

La supro respondis per „hura“ (anstataŭ „la homoj, kiuj troviĝis sur la supro“). *La tuta tablo eksplodiĝis per rido* (Z) (anstataŭ „la homoj ĉirkaŭ la tablo“).

Sinekdoko estas speco de metonimio, kiu entenas alinomigon laŭ kvanto.. aŭ amplekso, diras parton anstataŭ tuton (aŭ kontraŭe).

Ekzemplo:

Ne al glavo sangon soifanta... (anst. „al milito“).

Perifrazo estas esprimo, en kiu oni anstataŭas la nomon de la objekto per priskribo de ĝiaj ecoj kaj karakterizaĵoj.

Ekzemploj:

La lingvo internacia anst. *Esperanto*. *La urbo de la 48-a UK* anst. *Sofio*.

Hiperbolo en vasta senco de la vorto estas nomata ĉia troigo kaj en malvasta — vorto aŭ esprimo kun metafora signifo, en kiu la nomata objekto aŭ fenomeno estas troigata ĝis nekredeblaj ampleksoj.

Ekzemploj:

Esperanto konkeros la mondon. Li havis da mono pli ol la steloj sur la ĉielo.

Litoto estas vorto aŭ esprimo, kiuj entenas malgrandigon.

Ekzemploj:

Mi deziras diri du vortojn. Unuvorte, tio estas malutila propono.

Ironio en vasta senco signifas ĉian mokon, en malvasta — vorton, en kiu oni metas metaforan signifon kontraŭan al ĝia ordinara senco. Oni diras „*nia belulino*“ pri iu malbela aŭ malbona virino, „*korifeoj*“ — pri iuj esperantistoj, kiuj mem konsideras sin multon sciantaj, kondukas tromemfide al la ceteraj. Se la ironia senco ne estas tre klara, oni metas la vorton en citilojn.

Tiuj estas iuj el la literaturaj figuroj. Per ili la lingvo estiĝas pli bildeca, pli emocia, pli efika.

KUNVENO DE LA VIRINOJ DUM LA 48-A

Dum la 48-a Kongreso estis aranĝita virina kunveno. Ĝin partoprenis pli ol 300 virinoj-esperantistinoj el multaj proksimaj kaj malproksimaj landoj.

Trajana Petkova, prezidantino de la esperantista virina sekcio ĉe la Komitato de la Bulgaraj virinoj, faris paroladon pri la laboro de la bulgaraj virinoj-esperantistinoj kaj pri la kongreso de la virinoj, kiu okazis je la 24-a de junio en Moskvo.

Pri la sama kongreso parolis ankaŭ Nina Dimitrievna — Sulje el USSR. Pri sia laboro kaj sperto parolis ankaŭ esperantistinoj el Hungario, Ĉeĥoslovakio, Nederlando kaj aliaj landoj.

Je la nomo de la kunveno oni sendis telegramon al la prezidanto de la Internacia Federacio de la Demokrataj Virinoj s-ino Eŭĝeni Koton, kaj al k-ino Nina Popova en Moskvo.

La kunveno akceptis la jenan rezolucion:

1) La kunveno de la virinoj — esperantistinoj pritraktis la demandojn, kiuj interesas la virinojn el la tuta mondo — por egalrajtoj, por paco kaj por feliĉa estonteco de la infanoj.

2) Ni admiras la Internacian Demokratian Organizaĵon pri ĝia granda laboro por batalo por egalrajtoj, por la protekto de la virinoj kaj la infanoj, por la fervora laboro por unuiĝo de la virinoj je la nomo por paco kaj solidareco.

3) La virinoj-esperantistinoj admiras la subskribon de la kontrakto inter USSR, USONO kaj ANGLIO, por ĉesigi la provojn per la atombomboj en la aero, la kosmo kaj sub la akvo.

4) Ni, la esperantistinoj, unuigitaj kun ĉiuj virinoj en niaj landoj promesas labori streĉe por la prospero de la kulturo, por la evoluo de Esperanto.

Vivu la virinoj-esperantistinoj!

Vivu nia bela kaj belsona lingvo Esperanto!

Vivu la Paco!

GLAŬKO POMPILIO — GASTO DE LA ESPERANTISTOJ EN JAMBOL

Je la 26-a de aŭgusto ĉi-jare gastis al la esperantistoj en Jambol la itala esperantisto Glaŭko Pompilio, konstanta kongresa sekretario de UEA — Rotterdam, Nederlando. Li estis kore renkontita ĉe la stacidomo kaj en la klubo de la esperantista societo „Maksim Gorkij“ — Jambol. Posttagmeze la gasto kune kun la esperantistoj en la urbo vizitis la urban ĝardenon „Vasil Kolarov“, kaj la saman vesperon en salono de modela popola legejo „Konsento“ okazis kunveno, en kiu G. Pompilio parolis pri la 48-a UEA-kongreso en Sofio, pri la 19-a tutmonda junulara espe-

rantista kongreso kaj pri la 8-a tutmonda infana esperantista kongreseto.

Je la 27-a de aŭgusto G. Pompilio vizitis vilaĝon Zimnica, distrikto de Jambol, kie li konatiĝis kun la agado de la unua en la distrikto vilaĝa esperantista societo „Amikeco“. La prezidanto de la vilaĝa konsilantaro Kurti Daskalov kaj la sekretario de Bulgara komunistarta partio — Dimităr Martinov akompanis la gaston kaj montris al li la salonojn de la nova kultura domo.

La gasto vizitis la unuan en Bulgario fazanejon, la historian preĝejon „Sankta Georgi“ kaj la muzeon en Jambol.


Vespere la Plenumkomitato de la urba konsilantaro — Jambol aranĝis por la gasto specialan renkontigon. La sekretario de la urba konsilantaro Georgi Ševkenov salutis la gaston, rakontis al li pri la pasinteco kaj la estonteco de la urbo kaj donacis al li albumon kaj gvidlibron de Jambol.

Je la 28-a de aŭgusto la gasto vizitis la ŝtatan entreprenon „Tabaka industrio“, la teksan fabrikon „Tunĝa“ kaj la konservan fabrikon „Frago“ — Jambol.

Ĉe sia forveturo la gasto diris:

—Miĵam proksimume 6 monatojn loĝas en Bulgario. Mia ĉesto estas en ligo kun la 48-a UEA-kongreso. Dum tiu tempo mi havis eblecon viziti multajn urbojn kaj vilaĝojn en Bulgario. Ĉie mi estas kore renkontita. Sed la gastadon en Jambol, la korecon kun kiu mi estis renkontita en via urbo, mi ne forgesos dum la tuta mia vivo!

D. Trudoljubov



Esperanta renkontiĝo en Harmanli

UNUAJ BULGARAJ ESPERANTISTOJ

La 18-an (la 30-an laŭ nova kalendarstilo) de septembro 1889 L. Zamenhof ricevis cenzuran permeson presi unuan „Adresaron de esperantistoj“, serion I-an, kun 1000 nomoj. Presado de „Adresaro“ daŭris kelkajn semajnojn kaj tial ĝi aperis en oktobro 1889. „Adresaro“ ampleksas 39 paĝojn. La nomoj de esperantistoj en alfabeto ordo estas presitaj sur paĝoj 3—35. Sur paĝo 35 estas nur 4 lastaj nomoj. Sub litero B estas enskribitaj 98 esperantistoj, inter ili Bogdanov, Pavel Miĥajloviĉ, S. Peterburg, Bolšaja Sadovaja, d. N. 62. M. S. Bogdanov (Bulgarujo) ne estas nomita. Estas enskribitaj 919 esperantistoj en Rusujo: dano Nielsen, Christian (N-ro 640), estonoj, germanoj, judoj, latvoj, litovoj, poloj, rusoj, svedoj Bäckström, Albert (n-ro 33), Lindström, Ida (n-ro 559), turkmeno Utjamiĉev, Achmet (n-ro 929). Estas enskribitaj 2 esperantistoj en Turkujo: n-ro 11, Alhadeŝ Jos., Rhodes, n-ro 255, Gaon, Daniel, Rhodes.

Poste Zamenhof publikigis pluajn „Adresarojn“. La 29-a, la lasta, eliris en marto aŭ aprilo 1909 (OV, 558). En „Adresaro“, serio 16, sur p. 47, Zamenhof skribas: „La serioj 2—11, 15 estis presitaj siatempe en „La Esperantisto“ kaj en apartaj broŝuroj ili ne ekzistas“.

Merita s-ano Antonio Caetano de

Azeredo Coutinho (li naskigis 19 okt 1879, esperantisto de aprilo 1898), Rua Ana Barbara 48, Meier, Rio de Janeiro, Brazilo, pruntis al mi binditan libron de „Adresaroj“, serioj 1, 12, 13, 14, 16, 17, 19, 20, 21, 22, 23. En tiuj ĉi 11 „Adresaroj“ estas 6208 nomoj kaj en ĉiuj 29 „Adresaroj“ estas enskribitaj 21915 nomoj.

Malnova esperantisto R. Sakowicz en Polujo posedas „Adresaron“, serion 25, sed por mia grava laboro li ĝin prunti rifuzis. Lia ago rememoras bonan rusan proverbon: „Leĵit sobaka na sene, sama ne jesti skotine ne daĵet“ — sur fojno hundo kuŝas, mem ne manĝas kaj al bruto ne permesas.

En biblioteko de Brita Esperanto-Asocio estas ĉiuj jarkolektoj de unua esperanta gazeto „La Esperantisto“, sed fotografaĵojn de dokumentoj Biblioteko ne faras. En Brita Muzeo en Londono plej verŝajne ankaŭ estas ĉiuj jarkolektoj de „La Esperantisto“. Mendo de fotokopioj de dokumentoj devas atendi kelkajn monatojn. En serioj 2—11, 15, presitaj en „La Esperantisto“, estas enskribitaj bulgaraj esperantistoj.

Sur bazo de 11 Zamenhof-adresaroj, de originala Verkaro de Zamenhof, Historio de E-o, 1913, p. 144 kaj katalogo de G. Davidov el Saratov mi pretigis liston de „Adresaroj“.

1. I serio	(26. 7. 1887	1. 9. 1889)	39 p.	1— 1000	1000
2. II—XI	(1. 9. 1889 — 1. 11. 1892)			1001— 2054	1054
3. XII	(1. 11. 1892 — 1. 1. 1893)		12 p.	2055— 2351	297
4. XIII	(1. 1. 1893 — 1. 4. 1893)		8 p.	2352— 2583	232
5. XIV	(1. 4. 1893 — 1. 7. 1893)		8 p.	2584— 2899	316
6. XV	(1. 7. 1893 — 1. 10. 1893)			2900— 3000	101
7. XVI	(1. 10. 1893 — 1. 10. 1895)		47 p.	3001— 3602	602
8. XVII	(1. 10. 1895 — 1. 1. 1897)		24 p.	3603— 3997	395
9. XVIII	(1. 1. 1897 — 1. 1. 1898)		24 p.	3998— 4333	336
10. XIX	(1. 1. 1898 — 1. 1. 1899)		23 p.	4334— 4660	327
11. XX	(1. 1. 1899 — 1. 1. 1900)		28 p.	4661— 5025	365

12. XXI	(1. 1. 1900 — 1. 1. 1901)	36 p.	5026— 5567	542
13. XXII	(1. 1. 1901 — 1. 1. 1902)	40 p.	5568— 6578	1011
14. XXIII	(1. 1. 1902 — 1. 1. 1903)	46 p.	6579— 7699	1121
15. XXIV	(1. 1. 1903 — 1. 1. 1904)	32 p.	7700— 9260	1561
16. XXV	(1. 1. 1904 — 1. 1. 1905)	40 p.	9261—11199	1939
17. XXVI	(1. 1. 1905 — 1. 1. 1906)		11200—13103	1904
18. XXVII	(1. 1. 1906 — 1. 1. 1907)	63 p.	13104—16382	3279
19. XXVIII	(1. 1. 1907 — 1. 1. 1908)	55 p.	16383—19197	2815
20. XXIX	(1. 1. 1908 —31. 12. 1908)		19198—21915	2718

Entute

21915

Tie ĉi mi donas nomojn de bulgaraj esperantistoj, kiujn mi sukcesis trovi en la disponataj serioj. En serioj 1, 12, 13, 14 ne estas enskribitaj bulgaraj esperantistoj. (Ni prezentas la nomojn kaj la adresojn kiel ili estas skribitaj en la „Adresaroj“).

Serio 16

3017. Nikola D. Kovaĉev, redaktoro de la ĵurnalo „Svjet“. Sofia.

3018. Georgi Kovaĉev, lernanto-realisto. Tirnovo Gr.

1343. G. Oreškov, telegrafisto. Gorna-Orehovitza.

1367. Hr. Popov, Tirnovo — Dolna-Orehovitza.

Serio 17

3657. Todor Obreškov, učitel. Gorna-Orehovitza.

Serio 19

4486. V(elko) P(eev) Uzunskij, popola instruisto, Malki-Ĉardak, Filipopli.

Serio 20

4728. D. Z. Ĵivkov, instruisto, Ĉungurus, p. Viddin.

4733. Nikolaj Balliev, učitel, Dobriĉ.

4752. Hristo Koeff (tel-poŝĉenski uĉenik). Gabarevo, Kazanlichco.

4753. Ignat Hristov, Gorna Orenovitza.

4774. Penko Petroff, komercisto, Jambol.

4775. Georg Štereff, komercisto, Jambol, Samujlova Nr. 293.

4776. Vasil Todoroff, instruisto, Ĵeravno.

4792. Svetoslav Ivanoff Maneff, feldŝer. Kotel.

4802. Stojan V. Buĉkovski, feldŝer. Kula. ul. Glavna.

4819. M(anoil) Angeloff, Bakal. Lompalanka, Boulevard Ferdinand.

4820. Petr S. Kolaroff, feldŝer po Medicinata. Lompalanka, Boulevard Ferdinand Nr. 563.

4821. Aleksandr Nikolĉoff, skribisto en la kontoro de D. Zenoff et Frotioj, Lompalanka, str. Ferdinand.

4822. Gr(igor) Todoroff (Ŝivaĉ). Lompalanka, str. Natschaeva, d. Nr. 1785.

4908. Jurdan D. Boĝiloff, lernanto de praktika terlabora lernejo. Sadovo.

4910. Dimitr P. Georgieff Buberoff, lernanto de la Teologia lernejo. Samokov.

4911. Trifon Daneff Karakaŝeff, lernanto de la Teologia lernejo. Samokov.

4912. C(oĉo) Ralĉeff, lernanto de Seminario. Samokov.

4919. Ivan Gulinoŝ, telegrafo-poŝĉenski uĉenik. Sevlievo.

4924. Urdano Baltaĝieff, skribisto, libro-kondukanto. Sistovo, ul. Sadihina, d. 634.

4925. Dobri Boĝiloff, ĉélève à L'Ecole de Commerce. Sistovo, Borisovska Nr. 377.

4926. Janaki Boĝiloff, ĉélève à L'Ecole de Commerce, Sistovo, Borisovska Nr. 377.

4927. B (ojĉo) D (imoff) Bojĉoff, èlève à L'Ecole de Commerce, Sistovo, Vasilevska Nr. 1409.
4928. Botju Djulgerov, skribisto, librokondukanto. Sistovo, ul. Borisova d. 365.
4929. Ĥristo Popov, èlève à L'Ecole de Commerce. Sistovo, Haĝi Vasilevska Nr. 1409.
4930. Thoma Vasileff, èlève à L'Ecole de Commerce. Sistovo, str. Gurkovska.
4936. Stephan Guidicoff, ĵurnalisto. Sliven.
4938. Christo P (etroff) Bacaloff, maître. Sosopole.
4939. Al. K. Bollneff, farmaciisto, Sosopole.
4940. Christo Janeff Nicoloff, feldŝer. Sosopole.
4941. Dimitre Iv. Paziteloff, telegrafisto. Sosopole.
4974. Ivan Andreev. Ŝumen, Kostova ĉast.
4982. Asen L. Lincoff. Sviŝtov, str. Gurkovska 503.
4987. Charalambi Iv. Batchvaroff, lernanto, Tirnovo, str. Gurko 1591.
5009. Fraŭlino Anastasia Marinova, instruistino, Veliko-Tirnovo.
5010. Ilias (Nikolov Janakev) Zlatev, uĉenik, Veliko-Tirnovo.
5025. Kr(estan) Eft. Krestanoff, telegrafisto. Zlatitza, prov. Sofia.
- Ŝangitaj adresoj:
- Georgij P. Oreŝkoff. Poŝta oficisto. Philippopli.

Serio 21

5046. Asparuh Hr. Veleu, lernanto de gimnazio. Sofia, ul. Krakra.
5047. Rousco Vassilev, profesoro. Gradetch.
5048. Neichto Ivanoff, lernanto. Kazanlik.
5049. Dimitre Peyeff, lernanto de pedagogio. Kazanlik, ul. Aleksandrovska.
5050. Vasil T. Dologianov, subnirurgo. Burgas, Polkovi Lazaret.
5051. D. G. Doitcheff, skribisto. Omana K. Agatchko.
5052. Conko Nikoloff, subĥirurgo. Gradetz — Kotensko.
5053. Svetoslav N. Trenkoff, employé de chemins de fer. Gare-Jamboli.
5054. Xerouvim Kozlovsky, employé des chemins de fer. Gare-Jamboli.
5058. K (osto) Bojnov, Plevna, Dolnij Dabnik.
5096. Stefan Hr (istoff) Krokodiloff, lernanto de la Seminario. Tchirpan.
5097. Botu N. Sultanof, instruisto, ĵurnalisto, Gorna-Orehovitz.
5104. Marko Jurdanov, lernanto de kiasika gimnazio. Veliko-Tirnovo.
5118. Ĥristo Ĥaralambef, lernanto. V. Tirnovo, maĥala Sv. Nikola.
5123. Bojan Nedef, lern. de gimnazio. Roustchouk.
5124. George Angeloff, poruĉik, Stara Zagora, 12 p. Balkanskij Polk.
5126. Stojan Dimitrov Melnikov. Karnobat.
5129. Nikola G. Sokerov, lernanto. Drjenovo.
5156. Dimitre Micoff, Sofia ul. Vitocha 4.
5176. Boris Ĥristev. Bela-Slatina.
5180. Petro Urdanov, V. Tirnovo, maĥ. Sv. Nikola 700.
5181. Genĉo Ĥristov, lernanto de Seminario, Samokov.
5182. Vasil Gachovski, instruisto. Bela Slatina, ul. Christo Botiof.
5183. Ivan P. Boiddjief, instruisto. Bela Slatina, ul. Tzar Simeon.
5184. Michail Christov, instruisto. Bela Slatina.
5185. Stefan Detcheff, lernanto. Varna, Rue Rilska Nr. 3, qu. 5.
5186. Boris I. Budakov, skribisto. Kavahlij.
5196. Constantine P (etroff) Coutzaroff, lernanto. Osman Pazar.
5199. T. Kanef, lernanto de gimnazio. Filipoplo.

5200. Dimo Sotirof, studento de pentrado. Sofia.
 5202. Dragoj Hr. Koŝejkof, telegrafisto. Kalofer.
 5204. Georgij Atanasov, lernanto de gimnazio. Varna, ul. Boteva Nr. 47.
 5208. Hristo Dreharof, instruisto. Koprivchitza.
 5209. Theodor M. Vodeničarov, instruisto, Tirnovo, vilaĝo Puŝevo.
 5210. Vassil Filipoff, lernanto. O. Pozar.
 5212. Vassil Stojnoff, lernanto de la komerca lernejo. Sistov. str. Aleksandrovska 53.
 5213. Stamenko Ivanoff, lernanto de la komerca lernejo. Sistovo.
 5218. Hristo Haĝi Valčanof. Jambol, str. Koburga 34.
 5221. D. Stoicov, lernanto. Varna, 36, rue Charska, kv.5.
 5223. Georgio T. Lazarov, skribisto. Tirnovo.
 5227. Kolju Vančev, polica patrolisto, Stanimaka.
 5228. Stefan Tinterov, lernanto de la gimnazio de Aleksandro I. Philippople.
 5233. Dimitre St. Mintcheff, lernanto de la komerca lernejo. Sistov, Gzar-Plostad Nr. 1518.
 5234. Guentcho Stainoff, lernanto de la komerca lernejo. Sistov.
 5235. Ivan Hr. Crémacoff, lernanto de la komerca lernejo. Sistov.
 5237. Ilia Teodorov, lernanto de gimnazio. Roustchouk.
 5238. Alex. Pavloff, korespondisto. Kazanlik.
 5240. Josef Petkov, instruisto. Pavlikenio.
 5243. Stefan Ivanov Pentchev, poŝto-telegrafa lernanto. Sevlievo.
 5248. Aleksandre Iv. Koulin, fotografisto, Sofia, rue Tzar-Chichman 40.
 5249. Georgo P. Zografski, lernanto de gimnazio. Sofia, boul. Dondukov 76
 5251. Dončo Semkov, lernanto de la komerca lernejo. Sistov. rue Hadji Dimitre № 2508.
 5252. Stefan Kiliovski, lernanto de la komerca lernejo, Sistov.
 5259. Nikola Gullev, lernanto de gimnazio, Sofia.
 5263. Cezar Vinkitch, Roustchouk, „Bulgaria“, l-ère Societé d'assurances.
 5271. Vladimir D (imitrov) Nikolov, lernanto de la komerca lernejo. Sistovo str. Antakevska № 3866.
 5277. G. Nikolov, lernanto. Philippople, str. Ermenska № 11.
 5278. Russe Ivanov, librovendisto. Philippople, librejo Galunski.
 5279. Dimitr Ĵeliavski, instruisto. Sestrimo-Pazarĵiŝko.
 5280. Srebro Šterev, oficisto. Katunsko-Konare.
 5281. Raina Petrova, instruistino, Katunica.
 5282. Maria Pejeva, instruistino, Katunsko-Konare.
 5283. D. Ivanakev, instruisto. Sliven.
 5284. Ivan Petroff, telefonisto. Philippople.
 5288. Anastasia Marinova Volčeva, instruistino, Veliko-Tirnovo.
 5289. Ekaterina G. Dorosieva. Philippople.
 5290. Blanka G. Oreškova, lernantino. Philippople.
 5291. Raina Petrova, instrustino, 18 jaroj, Philippople.
 5292. Petko G. Sapunĝieff. lernanto de gimnazio. Philippople.
 5293. Wacile Christoff, instruisto. Torosse, okol Loucovitska.
 5294. Stefan G. Oreškov, lernanto, Philippople.
 5295. Ilia S. Bobtcheff, advokato. Philippople.
 5296. Mois A. Koen, instruisto. Pazardjik.
 5297. Mihail H. Petroff, instruisto. Malko-Yageli-Haskovo.
 5298. Angel Vasilieff, instruisto, Katunsko-Konare.

5299. Dobri B. Balabanov, komercisto. Raskovo.
 5306. Ljuben Dimitrov, komercisto, Jambol.
 5312. Slav Vasilev, kontoristo. Varna, str. Rilska № 3.
 5314. Ivan Pavlovski, pisar v okrujnata učilišna inspektia. Osman-Pazaro.
 5319. Panaiot Angeloff. lernanto de gimnazio. Varna, 36, rue 6 Septembre 5.
 5342. A. Sabetaeff, lernanto en la komerca lernejo. Sistovo.
 5386. Sergi G. Fičev, lernanto de la komerca lernejo. Sistov, Ecole de Commerce (Knjaz-Mirska 1447).
 5478. Petro Jekov, lernanto de gimnazio, Varna.
 5479. Kosto Todorov, lernanto de gimnazio. Varna.
 5482. Aleksandr N. Nejčeff, seminariano, Stara Zagora.
 5484. Stefan Ganjev, seminariano, Cecha, Drenovska okolia.
 5485. Ĥristo K. Popov, seminariano, Sadovec, Lukovitska okolia, n-r 46.
 5486. Velčo S. Gradinarov, seminariano, Ljubenovo, T. Sejmenska okolia.
 5487. Pervan Andreev, seminariano. Beli-Mel. Ferdinandska okolia.
 5492. H. Velkov, instruisto, Saranli (Harmanlicko).
 5498. Isaak J. Eskenazi, skribisto, Jambol.
 5500. Josif Radionov, seminariano, Lovetch, ul. Protestanska.
 5501. Nikola J. Minkov, seminariano, Samokov.
 5502. Stilian Kretev, seminariano. Veliko-Tirnov, kv. „Sv. Atanas“, 1863.
 5503. Keno Cekoff, seminariano. Kojnare, Belo-Slatinska okolia.
 5504. Minčo Kolev, seminariano. Samokov, Seminarijata.
 5510. Nikolaj Stefanov, skribisto en postojanna Okrajna Komisia, Varna.
 5531. Vasil Racheff. Jambol.
 5533. Jean Noeff, lernanto de gimnazio. Varna, rue Voinichka, 11.
 5534. Luko Delov, agento de la asekura societo „Balkan“. Philipople.
 5535. Angel Georgiev Sarov, skribisto. Stanimaka.
 5536. Teodor Kantardjiev, redaktoro de la gazeto „Novosti“ Philipople.
 5537. Gavrail Panajotov, lernanto de la greka gimnazio. Plovdiv.
 Ripetitaj adresoj :
 2971. G. Oreškov, telegrafisto. Philipople.
 4982. Asen L. Linkov. amanto de muziko. Sistovo (Svištov).

Serio 22

5570. Dimitrij Zlatarov. Silistrio, Dondukova 341.
 5571. Ĥristo Totev, en gimnazio. Roustchouk.
 5572. Georgij K. Mirtscheff, Widin, rue Dondukov № 1023.
 5592. Aleksandro Velčev, libristo. Varna.
 5596. Petr Ivanov, Philipopli, Giul-Bahca.
 5598. Georgi Pop. Constantinople, Turkujo. Seminario Bulgara.
 5607. Dimitre Gančev, librokondukanto ĉe la fratoj Kerekovi. V. Tirnovo.
 5616. Ivan Janev, Varna, Gr. № 3, rue Preslavska 31.
 5621. Petr Z. Marikin. Samokovo.
 5625. Ivan Vasilev, Plovdiv kontoro de N. K. Abadjief.
 5628. Kosta Kostandinoff. Stara Zagora.
 5650. Radoslav Avramov, Gorna Orenovitza, vilaĝo Arbanasi.
 5651. Kristo P. Kančef. Tirnovo, str. Zelenka.
 5652. Petr Bobev, libristo. Tirnovo, str. Bulevard.
 5653. Nikola Ĥaralambev. Tirnovo. kv. Sv. Nikola.
 5654. Georgi Ĥaralambev, Tirnovo, kv. sv. Nikola.
 5655. Dimitr Simeonov, Tirnovo, kv. Sv. Nikola.

5656. Petko Gančev, gimnaziano, Tirnovo.
5657. Panajot D. Ballis, farmacia lernanto, Plevna.
5659. Angel Welitchkoff. Mehmedkui, Bourgazska okolia.
5689. Ivan St. Dimitrov, Stara Zagora.
5693. Lazaro Hiagalot. Stara Zagora, vilaĝo Marničanio.
5701. Stefan Kolev, en la Seminario, Samokov.
5702. Dimitr S. Koprinarev. Karlovo, ul. Platnareva.
5703. Dimitr Andrejev, lernanto de la Teologia lernejo. Samokov.
5704. Vasil Simeonov. Samokov, Seminario.
5722. V. D. Ačlarski. Karnobat.
5743. Lazar Hristov. Sistov, Gzar Plostad № 1518.
5744. V. Ir. Arnaudoff. Sistov, Gzar Plostad № 1518.
5748. Todor Dimitroff. Kirk-Kilisise (Losin), Turkujo, Mahala Hatidje-Hatum.
5770. Todor L. Rablochof, Chumen.
5778. Marko S. Saračef. Karnobat.
5789. Dobrev. Ruse.
5790. Jordan Daskalov. Dolna Lipnica, Tirnovsko.
5791. Cano Mirčef, skribisto en la stabo de la 5 Dun. divizio. Ruscuk.
5800. Bojan Mihajlov, Haskovo.
5804. Behor Ousiel Peres. Plovdiv, Orta Mesar.
5807. Šemaja B. Geron. Philippople, Orfa Mezar.
5808. Dončo Mančov Sakarlj — Filipoplo.
5820. Dimitr Hr. Sveštaroff, Silistrio, str. Šipčenka, Nr. 1097.
5836. Samuel J. Geron. Razgrad.
5837. Nejčo Jelev, feldŝer-veterinar. Buĵuriŝte, Sofijsko.
5838. Ivan Bradinov, Sofia, 41 Rue Dragalevska.
5840. Simeon G. Pialoglou, Samsoun, Mer Noire, Turkujo.
5872. Konstantino Georgiev, kadeto, Sofia, Milita gimnazio.
5879. Raŝko Rajčinov, Plovdiv, Kapano 8.
5902. Jani Višanoff, Silistria.
5903. Georgi Manolov. Silistria.
5904. Lefter Arnaudoff, Silistria.
5905. Mihail J. Arnaudoff, Silistria.
5906. Lefter Arnaudof. Silistria.
5907. Radi J. Naumcoff. Silistria.
5908. Petr H. Joteff. Silistria.
5923. Asen Astadjoff. Razgrad.
5924. Ivan Nikolof, Zavet, Razgradsko.
5925. N. P. Valnarof. Razgrad.
5926. Hristo Gančev, felŝer veterinar. Buĵuriŝte. Sofijsko.
5930. Ivan Rataroff, telegrafisto. Philippople.
5931. Ivan St. Panitza, Varna.

(daŭrigota)

Cefredaktoro: Violin OLANOV

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Atanas LAKOV, Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: Delka Ĉolakova

Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 3-26-82

АБОНАМЕНТИ ЗА 1964

РЕП откри кампанията за набиране на абонати
Начинът за абониране за

„BULGARA ESPERANTISTO“

и другите списания остава същият. Ръководствата
да вземат кочани от местните пощи и веднага да
организируют кампанията

Крайният срок е 20 декември !

РЕП приема абонаменти и за „Расо“, „Internacia ĵurnalisto“ и „Nuntempa Bulgario“
Номерата на есперантските списания в каталога на
РЕП са: 12, 19, 194, 195 и 196

Другари, не чакайте крайния срок! Да не остане
нито един есперантист, нито един курсист без нашия
съюзен орган **„Bulgara Esperantisto“!**

Излезе от печат

УЧЕБНИК ПО ЕСПЕРАНТО

от Иван Сарафов и Симеон Хесапчиев

V стереотипно издание

Цена 0,57 лв.

Доставя се от книжарниците на ДТП „Печатни
произведения“ и Българската есперантска кооперация